

# **La Libro de Mormon - Titolpaĝo, Enkonduko kaj Klarigo**

Ĉi-sube prezentiĝas kompreno de la Libro de Mormono, kiu estas la Titolpaĝo, la Enkonduko kaj unuaj klarigoj pri la origino de la libro. Ili enhavas informojn pri la diversaj lamenoj el kiuj Jozefo Smith tradukis la verkon anglalingven.

## **Titolpaĝo de la Libro de Mormon**

### **Kroniko skribata propramane de Mormon sur lamenoj elprenitaj el la lamenoj de Nifai**

Tiu ĉi libro estas mallongigo de la kroniko de la popolo de Nifai kaj ankaŭ la Lamanidoj. Skribita al la Lamanidoj, kiuj estas restaĵoj de la domo de Izrael, kaj ankaŭ al la Judoj kaj nejudoj. Skribita pro la ordono de, kaj pere de la Spirito de profetado kaj revelacio. Tiu ĉi kroniko estis skribita, kaj sigelfermita kaj kaŝita al la Eternulo, por ke ĝi ne estu detruita. Ĝi estis eligita al taglumo fare de la donaco kaj povo de Dio, por esti tradukita. Sigelfermita per la mano de Moroni kaj deponita al la Eternulo, por ke ĝi, en konvena tempo estu eligita al la nejudoj. Ĝia traduko okazis sekve de la donaco de Dio.

Krom, ankaŭ mallongigo de la Libro de Etero, kiu estas kroniko de la popolo de Jared, kiu estis dispersita en la tempo, kiam la Eternulo konfuzis la lingvon de la popolo dum ili konstruis turon, por tiamaniere supreniri en la ĉielon. Tiu ĉi libro celas montri al la restaĵo de la domo de Izrael kiajn grandajn aĵojn faris la Eternulo al iliaj patroj, por ke ili konstatu la interligon de la Eternulo, ke ili ne estu forĵetitaj por ĉiam. Ĝi celas ankaŭ konvinki la Judojn kaj la nejudojn, ke Jesuo estas la Kristo kaj la Eterna Dio, kiu malkaŝiĝas al ĉiuj popoloj. Se eventuale aperos eraroj en tiu ĉi libro, ili estas eraroj de homoj; tial, ne kondamnu la verkon de Dio, por ke vi aperu senmakulaj antaŭ la tribunalo de Kristo.

Tradukita de Jozefo Smith, filo.

## **Enkonduko de la Libro de Mormon**

La Libro de Mormon estas volumo de sankta Skribo komparebla al la Biblio. Ĝi estas rekordo la interrilatoj de Dio kun antikvaj loĝantoj de Ameriko kaj enhavas la plenecon de la eterna evangelio.

La libro estis skribita de multaj antikvaj profetoj pere de la spirito de profetado kaj revelacio. Iliaj vortoj, skribitaj sur oraj lamenoj, estis citataj kaj mallongigitaj de profeto-historiisto nomata Mormon. La rekordo donas rakonton de du grandaj civilizacioj. Unu venis el Jerusalemo en 600 a.K. kaj poste apartiĝita en du nacioj, konataj kiel la Nifaiidoj kaj Lamanidoj. La alia venis multe pli frue, kiam la Sinjoro konfuzis la lingvojn ĉe la Turo de Babelo. Tiu grupo estas konita kiel la Jaredites. Post miloj da jaroj, ĉiuj pereis krom la Lamanidoj, kaj ili estas inter la prauloj de la amerikaj indianoj.

La kronanta okazaĵo, kio estas gravurita en la Libro de Mormon estas la persona pastrado de la Sinjoro Jesuo Kristo al la Nifaiidoj baldaŭ post lia releviĝo. Li aperigas la doktrinojn de la evangelio, skizas la planon de savo, kaj diras al la homoj, kion ili devas fari por gajni pacon en ĉi tiu vivo kaj eterna savo en la vivo venonta.

Post Mormon kompletis liajn skribojn, li transdonis la rakonton al sia filo Moroni, kiu aldonis kelkajn vortojn el sia propra kaj kaŝis la lamenojn en la Monteto Kumorah. La 21an de septembro 1823, la sama Moroni, tiam glorata, relevigita estaĵo, aperis al la profeto Jozefo Smith kaj instruis lin pri la antikva rekordo kaj lia destinita traduko en la anglan lingvon. En pro paso la lamenoj estis transdonitaj al Jozefo Smith, kiu tradukis ilin per la donaco kaj povo de Dio. La rekordo estas nun eldonita en multaj lingvoj kiel nova kaj aldona atesto, ke Jesuo Kristo estas la Filo de la vivanta Dio, kaj ke ĉiuj povas saviĝi, kiuj venos al Li kaj obeas la leĝojn kaj ordinojn de Sia evangelio.

Pri tiu rekordo la Profeto Joseph Smith deklaris: "Mi diris al la fratoj, ke la Libro de Mormon estis la plej ĝusta el ajna libro sur la tero, kaj la ĉefŝtono de nia religio, kaj homo akirus pli proksimen al Dio per la plenumado de ĝiaj ordonoj, ol per iu ajn alia libro."

Krom Jozefo Smith, la Sinjoro aranĝis por dek unu aliuloj vidi la lamenojn de oro por si mem kaj por estu specialaj atestantoj de la vero kaj dieco de la Libro de Mormon. Iliaj skribitaj atestoj estas konitaj kiel "La atesto de la Tri Atestantoj" kaj "La atesto de Ok Atestantoj."

Ni invitas ĉiujn homojn ĉie legi la Libron de Mormon, kaj mediti en iliaj koroj la mesaĝon, kion ĝi enhavas, kaj poste peti Dion, la Eternan Patron, en la nomo de Kristo, ĉu la libro estas vera. Tiuj, kiuj postkuras ĉi kurson kaj petas fideinde, estos donitaj atesto pri ĝiaj vero kaj dieco de la povo de la Sankta Spirito. (Vidu Moroni 10:3-5.)

Tiuj, kiuj akiras tiun dian ateston de la Sankta Spirito ankaŭ scios per la sama povo, ke Jesuo Kristo estas la Savanto de la mondo, ke Jozefo Smith estas Lia revelacianto kaj profeto en ĉi tiuj lastaj tagoj, kaj ke la Eklezio de Jesuo Kristo de Sanktuloj de la Lastaj Tagoj estas la regno de la Sinjoro, denove establita sur la tero, kaj prepara por la Dua Alveno de la Mesio.

## Mallonga Klarigo pri la Libro de Mormon

La Libro de Mormon estas sankta rakonto de popoloj en antikva Ameriko kaj estis gravurita sur metalaj lamenoj. Fontoj el kiu ĉi tiu rakonto estis kompilita inkluzivas jeno:

1. La lamenoj de Nifai: ili konsistas, kiel evidentiĝas en la tekso, el du specoj; a) la grandaj lamenoj, kaj b) la malgrandaj lamenoj. La unuaj servis por registri la sekularan historion de la respektivaj popoloj, dum la lasta menciitaj temas pri religiaj aferoj.
2. La lamenoj de Mormono: kiuj surhavis la mallongigon de la lamenoj de Nifai, skribitan de Mormono, kun komentarioj kaj daŭrigo de la historio fare de li mem, kaj kun pliaj aldonoj de Moroni, filo de Mormono.
3. La lamenoj de Etero: kiuj surhavis la historion de la Jaredidoj. Moroni mallongigis tiun raporton, enmetis en ĝin, sian propran komenton kaj transmetis ĝin en la generalan historion sub la titolo "Libro de Etero".

Al tiuj lamenoj povas ankaŭ esti alkalkulita alia serio de lamenoj kiuj ankaŭ ofte estas menciitaj en la Libro de Mormon, nome:

4. La latunaj lamenoj de Labano: kiujn kunportis la popolo de Lihai el Jerusalemo, kaj kiuj ampleksas la hebreajn skribojn kun geneologiaj registroj, de kiuj multaj eltiraĵoj troviĝas en la kroniko.

La Libro de Mormon dividiĝas en dek-kvin ĉef-partojn aŭ sekciojn kiuj, kun unu escepto, estas indikitaj kiel libroj, kaj titolitaj laŭ la nomo de sia ĉefaŭtoro. El tiuj, la unuaj ses libroj, I Nifai, II Nifai, la Libro de Jakobo, la Libro de Enos, la Libro de Jaron kaj la Libro de Omni estas tradukoj el la respektivaj partoj de la malgrandaj lamenoj de Nifai. Inter la Libro de Omni kaj la Libro de Mozaia troviĝas la Vortoj de Mormono, kiuj kunligas la kronikon de Nifai, kiel ĝi estas gravurita sur la malgrandaj lamenoj, kun mallongigo de la grandaj lamenoj fare de Mormono por la sekvantaj periodoj. La Vortoj de Mormono konsistigas koncizan komenton pri la antaŭaj partoj de la kroniko kaj enkondukas en la sekvajn partojn.

La ĉefparto de la libro, ekde Mozaia ĝis Mormono ĉapitro 7, estis tradukita el la lamenoj de Nifai, mallongigita de Mormono. La lasta parto de la Libro ekde la komenco de ĉapitro 8 de la Libro de Mormon ĝis la fino estis de Moroni, la filo de Mormono, kiu unue finverkis la biografion de sia patro kaj poste mallongigon de la popolo de Jaredo, kiu estas konata kiel la Libro de Etero. Poste li aldonis la partojn kiuj nun konsistigas la Libron de Moroni.

La periodo, pri kiu temas la kroniko de la Libro de Mormon etendiĝas ekde la jaro 600 a.K. ĝis la jaro 421 p.K. En proksimume la lasta jaro Moroni, la lasta el la nifaidaj historiistoj, sigelfermis la sanktan kronikon kaj kaŝis ĝin al la Eternulo, por ke ĝi povu esti malkovrita en la lastaj tagoj, kiel antaŭdiris la voĉo de Dio per la antikvaj profetoj. En 1827, transdonis la sama Moroni, tiutempe releviĝinto, la lamenojn al Jozefo Smith. Per Dia donacopovo, Jozefo Smith tradukis la antikvajn skribojn anglalingven, kiuj nun estas konataj kiel la Libro de Mormon.